# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1973 1 (31)



## Donaco por Vjetnamio

Solidareca ondo trakuris la mondon post la intensigitaj bombadoj en Vjetnama demokratia respubliko. Seninterrompe venadas subteno el ĉiuj mondanguloj. Ankaŭ la ĉeĥaj esperantistoj volas kontribui... kampanjo "Helpe al la batalantaj amikoj en Vjetnamio" daŭre okupas la unuan lokon en ilia porpaca aktiveco. Por ebligi vojaĝon de la VPEA-delegitaro al Beogrado, la Porpaca sekcio de ĈEA akumulis 4330 kronojn kaj instigis imiti tiun ĉi ekzemplon ankaŭ la ceterajn sekciojn. Ĝi krome aĉetis dek biciklojn por Vjetnamio. La donacojn transdonis delegitoj de ĈEA en la ambasado de VDR en Praha la llan de dec.pasintjara. - Nia bildo montras k-don Nguyen duc Nam, legacian ataŝeon, en la interparolo kun Tomáš Balda, ĝenerala sekretario de M E M kaj laŭreato de la Ĉs.pacpremio.

# EK AL...

Josef VÍTEK
la prezidanto
de ĈEA

Jam pli ol tri jarojn ekzistas nia Asocio, tamen ni ne povas esti kontentaj pri la rezultoj atingitaj. Nia organiza strukturo, nia por- kaj peresperanta laboro ne donas la deziratajn fruktojn, nia membraro supozas, ke ni mem kulpas, uzante malmodernajn labormetodojn, nemulte konformajn al la samtempa viva realo kaj celado de nia ŝtato. Tial jam sufiĉe longe la prezidantaro de nia Asocio strebas siajn fortojn por modernigi nian movadon kaj adapti ĝin, estigi ĝin ĉiuflanke modela. Tial la Dua kongreso estas prokrastita kaj ĝi ne okazis pasintjare.

Ekstere ni volas atingi plenan aprobon de niaj politikaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj, kio estonte faciligu nian ekziston morale kaj ankaŭ ekonomie.

Interne ni volas unue havi ĉiuflanke fortan kaj respondece laborantan Centran Komitaton, kies membroj, dissemitaj en ĉiuj regionoj de ČSR, devus esti veraj aktivuloj - en plenaj kontaktoj kun sialokaj gvidaj aŭtoritatoj. Ĝis nun nia laboro ofte tre suferis pro tio, ke la CK-membroj havis nur neoftajn rektajn kontaktojn kaj interkonsilajn kunvenojn: unuflanke kaŭze de la financa stato de nia Asocio, aliflanke pro tio, ke pluraj membrojmem ne konsideris necese partopreni la kunvokitajn plenkunsidojn kaj kunvenojn. Similaj membroj havas vere nenian lokon en la CK.

Kaj same estas absolute necese reorganizi kaj revigligi la laboron de ĉiuj sekcioj, speciale tiun de MEM - kaj Junulara sekcioj, kies aktivecojn ni konsideras la plej gravaj kaj signifaj. Ni ĉiuj ankaŭ tre bone scias, ke la asocio havas aŭ havis komisionojn, kiuj vivetas, aŭ pro diversaj kaŭzoj ĉesigis sian ekzistadon. Estas ja neeble, ke nur kelkaj spertuloj laboru ĝis sia elĉerpiĝo ekzemple en tri sekcioj kaj ĝiaj komisionoj nur pro tio, ke la aliaj spertaj esperantistoj retiriĝas aŭ havas alian opinion ol tiuj, kiuj havas gvidan funkcion. Ni do devas havi nur tiajn sekciojn kaj komisionojn, kiuj plene funkcios.

Kaj la tereno? Momente ni havas preskaŭ 90 pli malpli bone funkciantajn aŭ surpaperajn grupojn, kvankam jam du jarojn ni instigas ilin, ke ili iĝu lokaj grupoj de nia Asocio. Komprenebla kaj sole akceptebla fakto estu jena: ni havu nur grupojn, kiuj estas ĉiuflanke bonaj, t.e. kiuj havas sian klaran laborplanon kaj en siaj respektivaj lokoj taŭge kaj efike kunlaboros en ĉiuj aktivecoj; kiuj havos allogajn klerigajn programojn dum siaj kunvenoj ktp. Ni absolute ne celas plu havi grupojn kun nebulaj neutilaj celoj - kontraŭe, same kiel en la aliaj, ĉefe socialismaj landoj, ni klopodu esti modelaj.

Komprenble, por realigi la menciitajn planojn, estas necesa firma sekretariejo, en propraj ejoj kaj kun sindone, profesie laborantaj oficistoj, kiuj plene regas sian fakon kaj havas ampleksan, sed en siaj eroj koncizan kaj realigeblan laborplanon.

Inter niaj intencoj estas krei modernan reton de someraj edukaj tendaroj kaj lernejoj, kie instruus sole plene kvalifikitaj en- kaj eksterlandaj instruistoj. Ankaŭ pluraj alispecaj aranĝoj estus niaopinie utilaj.

Krome ni ne volas forgesi bonkvalitan eldonplanon kaj modela estu nia asocia presorgano, bonkvalita, akurate aperanta ligilo inter la Asocio kaj nia tereno ĝenerale. Ne eblos loke organizi diversajn aranĝojn sen scio kaj aprobo de la asocia gvidantaro, sed ankaŭ ne eblas fari vere utilajn aranĝojn kaj ne informi - ĝustatempe - la esperantistan publikon pere de ĝia presorgano.

Nature, ni tre funde pripensas la partoprenon de niaj membroj en diversaj eksterlandaj esperantistaj entreprenoj, speciale en la UK - kaj TEJO-kongresoj, ĉar ni forte deziras, ke tiajn aranĝojn partoprenu veraj reprezentantoj de nia movado kaj ne tiuj, kiuj hazarde sukcesis partopreni ilin kaj misuze eĉ "oficiale" tie alparolas kaj traktas!

Estontece ni antaŭvidas ankaŭ larĝan kunlaboron kun frataj gesamideanoj en Slovaka socialisma respubliko, kiuj plurrilate jam atingis mirindajn sukcesojn, ĉefe en la eduka sfero. Ni strebas niajn fortojn, ke iliaj kursoj perradiaj, sed speciale ilia modela TV-kurso estu prezentita ankaŭ al la ĉeĥa publiko ...

Profundan kunlaboron kaj interŝanĝon de spertoj ni celas havi ankaŭ kun la ceteraj socialismaj landoj kaj kun ĉi-

(daŭrigo sur la 6-a pg.)

# GRAVA PROGRESIGA PAŜO

La seminario de ĈEA aranĝita kunlabore kun la ĉeĥa kulturministerio en Měřín apud Praha /2.-4.12. 1972/ estis unu el la gravaj preparlaboraj agoj por la II-a kongreso de nia Asocio. La partoprenantoj estis ĉirkaŭ sesdek funkciuloj de lokaj grupoj, de sekcioj de ĈEA kaj asociaj komitatanoj. La ministerion reprezentis k-dino Věra Kršková.

La seminarianoj kun intereso aŭskultis kelkajn fakprelegojn: pri la laborista movado en la ĉeĥaj landoj de doc.d-ro Václav J í š a, scienca laboranto de Instituto de marksismo-leninismo de CK KPĈ, plue esperantologian prelegon de Detlev B l a n k e, sekr. de CLE en Berlino, kiu pritraktis ĝeneralajn kondiĉojn por enkonduko de la Internacia Lingvo, tuŝante ankaŭ Esperanto-movadon en la socialismaj landoj. Li substrekis, ke la ĉefa faktoro por sukcesigo de Esperanto tie estas, ke la movado ĉiuforte helpu integriĝon de la socialisma ŝtataro en la ekonomia kaj kultura sferoj. Doc.J.Knopp /Altlernejo de politikaj sciencoj, Praha/ prelegis pri paca kunekzistado de landoj kun malsama sociordo el vidpunkto de leninisma teorio.

Tre fruktodona montriĝis la lasta seminaria tago, kiam multaj partoprenantoj profitis la okazon por raporti pri la agado de unuopaj lokaj grupoj, pri porpaca aktiveco, someraj tendaroj ktp. Pri la preparoj por la asocia kongreso raportis D.Kočvara, vicprezidanto de ĈEA.

En Měřín kunsidis ankaŭ la estraro de Ĉeĥa Esperanto- Asocio sub la gvido de Josef Vítek, la komitato de la Porpaca sekcio sub la gvido de Tomáš Balda kaj la komisiono SET sub la gvido de Pavel Sittauer.

Aparte sincera estis amika renkontiĝo kun nia unusola eksterlanda gasto D.Blanke, kiu konigis al ni spertojn de la esperantistoj en GDR. /kní/

PRI LA TELEVIDA KURSO EN BRATISLAVA

# Esperanto sur bildekrano

Du plenajn tagojn pasigis en la televida studio apud Bratislava la recenzista kolektivo de AE SSR kun ĉefredaktoro J.Pavlec kaj liaj stabanoj, kiu spektis la tutan TV-kurson antaŭ ĝia publika apero. Por ĈEA partoprenis la projekciadon komitatano O.Knichal, anstataŭante la prezidanton J.Vítek.

Pretigo de la 17-a leciona kurso estas frukto de la dujara sindona kaj streĉega laboro de ties ĉefaŭtoro Pavel Rosa kaj de liaj oferemaj kunlaborantoj en la Slovaka televido. La redakcio de klerigaj programoj bonege komprenis la unikan rolon de Esperanto, prenante sur sin la taskon fari el ĝi efikan komunikilon ankaŭ sur tiu ĉi kampo, eksterordinare grava en la epoko de la sciencteknika revolucio - ne domaĝinte elspezojn. (Ĉiu leciono kostis 200 mil kronojn !)

La kurso - entute la unua en la socialismaj landoj - estas senprecedenca ne nur laŭ sia baza destino, sed ankaŭ laŭ vidpunkto teknika. Kun inventemo estis aplikitaj pluraj dialogoj intermiksitaj kun interesaj scenoj el diversaj medioj. Instrudona ekspliko de gramatikaj reguloj kaj bona elparolo de la rolantoj ankaŭ faras tiun ĉi kurson modela.

La kurso eniros la 2-an programon de Slovaka televido fine de marto aŭ komence de aprilo, ĉiuĵaŭde inter la 19-a kaj 20-a horo. Dum la lasta jarkvarono ĝi enviciĝos en la 1-an programon, t.e. por la tuta teritorio de SSR, kun ripetitaj elsendoj.

La filmo estas produktita por spektantoj en Ĉeĥoslovakio, sekve ankaŭ la ĉeĥa esperantista movado klopodos persvadi la televidon en Praha, ke ĝi laŭ siaj eblecoj transprenu la filmon, pri kiu jam montris intereson ankaŭ eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. La slovaka televido intencas prezenti plurajn filmojn el socialismaj landoj en Esp. versio kaj ankaŭ venonte popularigi nian kulturon pere de Esperanto. (kni)

# KUNSIDIS LA KOMITATO DE ĈEA

Pro foresto de la sekretario P.Polnický okazis nur unutaga/16.12./ plenkunsido de CK ĈEA gvidata de J.Vítek kaj D.Kočvara.

Analizan studon pri la lastjaraj eventoj kaj evoluo de la Esp.movado en ČSR tralegis D.Kočvara. Ĝi estis aprobita de la komitato kune kun la ceteraj dokumentoj prezentotaj al la II-a asocia kongreso, okazonta inter la 20-a kaj 23-a de aprilo : la agadprogramo de ĈEA/propono/ kaj kandidatlisto por CK.

La plenkunsido aprobis proponon de la estraro instali jenajn komisionojn de CK ĈEA :

politikedukan /prez.ark.J.Drlík, vicprez.ing.F.Sviták, sekr.T. Balda /

metodike-propagandan /prez. D.Kočvara, vicprez. d-ro J.Jermář, sekr. M.Josková, membroj : Z.Hršel, d-ro K.Máca, d-ro V.Novobilský, P.Polnický.

Pri la kontrol-projekciado de TV-kurso en Bratislava /vidu artikolon sur la 3-a paĝo/ raportis O.Knÿchal. D.Kočvara informis la ĉeestantojn pri la preparoj por la II-a kongreso en Ostrava. Li diris, ke de la pasinta jaro restis 172 aliĝintoj. CK bilancis ankaŭ la sukcesan klerigan seminarion en Měřín /vd.pĝ.3/.

Kiel oficialaj delegitoj por la 58-a UK en Beogrado estis aprobitaj D.Kočvara, ark.J.Drlík, inĝ.F.Sviták, M.Josková, T.Balda kaj O. Knÿchal/anstataŭanto/ - la lastaj tri por la VI-a Ĝenerala Konferenco de MEM - kaj fine J.Řeháková por la 29-a IJK en Sarajevo. /kni/

---

Okaze de la 20-jara jubileo de M E M Porpaca sekcio de ĈEA eldonis kvarkoloran insignon por la MEM-anoj.Efektiva formato 9 x 18 mm. Mendebla ĉe ĈEA por 6Kčs (0,50 US dolaro aŭ egalvaloro).El eksterlando akceptataj nur amasmendoj de landaj asocioj aŭ la landaj MEM-sekcioj.

## Recenzo

Boris LAVRENEV : LA KVARDEKUNUA. Sub la redakto de N.Danovskij eldonis Komisiono por internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj,Moskvo 1972.Ilustraĵoj:sceneroj el la samtitola filmo.80pĝ.28x19cm.

En la antaŭparolo skribas N.Danovskij, ke la verkoj de Lavrenev estas karakterizaj per "kunigo de heroa elemento kaj romantiko de kruda vero... La samaj trajtoj estas prezentitaj en la novelo "La kvardekunua"(1924).Dramecaj eventoj de la postrevolucia periodo en Sovetio respeguliĝas ankaŭ en la aliaj verkoj de Lavrenev,kiu ĝis la lasta vivtago daŭrigis sian partoprenon en la granda idea batalo de la nuntempo. (k)

JUNA AMIKO.Ĵus aperis provnumero de tiu ĉi internacia lerneja Esp.revuo kun varia enhavo.Se vi volas aboni ĝin,skribu al via landa asocio. Pĝ.24, 20x14 cm.

## Lingva ekzercisto

Trovu adekvatajn ĉeĥajn (E-ajn)esprimojn al jenaj parolturnoj en E-o (la ĉeĥa): ĝojsona rido,piedfingre postsekvi, elvolbi la bruston,delikate malleviĝi - - brát po smi schodech, hodit sebou, otevřít dokořán, vykoukat si oči, vlídně pokynout, pestrý příběh,vpadnouti někam.

Komparu vian solvon kun la teksto en la venonta numero !

---

UPOZORNĚNÍ. Toto číslo je poslední,které zasíláme všem členům platívším za rok 1972 ! ooo Vzhledem k tomu, že převážná většina SKP byla do uzávěrky Starta vyměněna, a také z úsporných důvodů, neuveřejnujeme výherní listinu, jak jsme původně slíbili.

## Rondeta vivo

B R N O - Malgraŭ multaj rimarkindaj afiŝoj kaj pluraj anoncoj en la urbaj radio, ĵurnaloj kaj lum-gazeto aliĝis al E-kurso nur sep personoj. Tian rezulton oni ne atendis, ĉar pri la lernolibroj de T.Kilian estis tre vigla intereso. Instruas J.Vondroušek, en la kurso por progresintoj Z.Hršel, J.Vondroušek kaj inĝ. J.Werner.

Okpaĝan faldfolion "Učíme se esperantu", eldonitan de Universitata Biblioteko en Brno, dissendas la klubo ankaŭ kun informiloj de ĈEA al ĉiuj klerigaj societoj ekster la urbo.

La klubo konstante pliriĉigas sian bibliotekon, en la lastaj monatoj ĝi akiris plurajn gravajn verkojn. Konstanta informado al la gazetaro daŭras.

H R A D E C K R Á L O V É - EK trovis por si lastatempe apogon de la urba kulturdomo de Revolucia Sindikata Movado, t.e. nun ĝi troviĝas sub ĝia protekto. Tiamaniere la esperantistoj akiris pli bonajn kondiĉojn por sia laboro.

En sia anticipa programo por 1973 la klubo, kiun gvidas Z.Matyková, anoncis prelegojn pri N.Kopernik, J.A. Komenio, filmon pri USSR k.a.

K O P Ř I V N I C E - Nova kurso kun 15 lernantoj komenciĝis en septembro ĉe ER ROH Tatra. La plej juna kursano R. Mastný partoprenis somere Internacian pioniran tendaron por esp.infanoj en Sikonda apud Pécs, Hungario.

En la kampanjo "Helpe al la batalanta Vjetnamio" la grupo kontribuis per 170 Kčs kaj sendis al VDR stencil-paperon. Enkadre de la monato de la ĉs.- sovetia amikeco oni projekciis la filmon "Lando, kiun mi amas" kaj du gekursanoj rakontis pri sia lastjara vizito al Sovetio.

M Ě L N Í K - Tagon de Esperanta libro rememoris la esperantista rondeto ĉe ZDŠ Jungmannovy sady. Pri la vivo kaj verko de L.L.Zamenhof prelegis Václav Vítek, kulturan kalejdoskopon preparis Jindra Řeháková kun kolektivo.

La grupo preparis en sia programo por 1973 i.a. kolorajn filmojn pri Vjetnamio, Moskvo, Parizo, Londono, Hungario kaj paskaj festoj en Meksikio.

O S T R A V A (VŽKG) - Jam 84 membroj plenumis sian bazan devon - paginte la kotizon por la asocio por 1972.

La rondeta komitato dissendis leteron al 60 lernejoj kun la alvoko, ke la infanoj uzu la eblecon studi Esperanton en la Regiona junulara domo en Mar. Hory.

Meze de novembro la junaj esperantistoj ekskursis al Katowice (Pollando). La rezulto estis sukcesa kaj oni planas ankaŭ venonte similajn aranĝojn.

Ú S T Í n/L. - Esperantistan renkontiĝon en Seifshennerdorf, GDR, partoprenis la EK-membro Miroslav Smyčka. La polaj amikoj invitis lin al Katowice. EK daŭre kontaktas kun la rondeto en Karl-Marx-Stadt, preparante viziton al iu koncertvespero tie.

V S E T Í N - Jarkunveno de EK okazis la 22an de januaro 1973 en granda salono de "Popola domo", kun projekciado de plaĉaj koloraj filmoj pri FIAT.

Antaŭmelonge estis eldonitaj poŝtkartoj kun la motivoj pri Valaĥio kaj pri junulara amikeco.

## Samideana kroniko

Forpasis la 8an de jan.1973 en Litomyšl Vítězslav B e n í č e k, aĝa 81 jaroj.

En Plzeň mortis la 29an de dec. Bohumil Z i k m u n d, membro de EK ĉe la uzina klubo ŠKODA.

Honoron al ilia memoro !

---

ĈU VIA INFANO PAROLAS ESPERANTON ?

Se jes, kaj se ĝi estas inter 6 kaj 13 jaroj, via infano povas travivi neforgeseblan libertempon en la 13-a Internacia Infana Kongreseto 1973 en Beogrado. Dank' al speciala fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" oni povas inviti ankaŭ infanojn el netranspagipovaj landoj por senpaga restado en Pionira urbo de Beogrado, kiu estas la loko de la infankongreseto. Petu detalojn ĉe la konstanta adreso de la kongreso : Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

ESPERANTISTAJ AMIKOJ EN SOVETIO ! Petu ĉe ĈEA (120 21, Praha 2, p.k.8, ČSR) senpage jarkolektojn de STARTO por viaj E. kluboj kaj aliaj organizaĵoj. Esperantaj publikaĵoj interŝanĝe bonvenaj !!!

Rudolf HORSKÝ

# NI EN MOSKVO



En la litvagono de la rapidtrajno Leningrado - Moskvo estas pli bone ol hejme en la ĉambro.Ĉie pure, eĉ en la koridoro estas tapiŝoj,samovaro bolas kaj tuj je ekveturo estas servata teo.En ĉiu kupeo - kvar litoj kun molaj lanaj kovriloj kaj blanka tolaĵo...

Ni vekiĝas frumatene kaj rigardas eksteren - ni veturas sur vasta ebenaĵo. Stacidomoj estas ankoraŭ malplenaj, sed ni proksimiĝas jam al Moskvo...Sur multaj lokoj estas videblaj grandaj legom-fabrikoj kaj vastaj paŝtejoj kun diverskolora brutaro.

Jarmila Glazarová en sia libro verkita preskaŭ antaŭ dudek jaroj, priskribante la vojaĝon el Moskvo al Leningrado, mencias, ke ĉie oni povis vidi frakasitajn urbetojn kaj bruligitajn vilaĝojn, dezertigitajn arbarojn kaj ruinaĵojn de kanonoj, tankoj...

Moskvon ni atingas akurate. Denove kora bonvenigo,jam preparitaj aŭtobusoj, portistoj forveturigas niajn valizojn, tiel ke ni devas pri nenio zorgi, sole elgustumi la belecon de novaj impresoj. Dumvoje el la stacidomo ni ekscias, ke nia loĝejo estos unu el la plej grandaj kaj belaj moskvaj hoteloj - ĝi estas "Ukraina", videbla jam de malproksime, sur la bela avenuo de generalo -marŝalo Kutuzov proksime de la rivero Moskvo. Ĉiuj etaĝoj de tiu ĉi konstruaĵo malkovras ravan panoramon de la urbo. Ni loĝas en la dudekunua. Antaŭ la hotelo elstaras, sur alta soklo, grandioza monumento de Taras Ŝevĉenko, la fama ukraina poeto kaj pentristo ; pro lia patriota kaj socia konscio la cara registaro kelkfoje arestis lin kaj sendis en ekzilon. El liaj verkoj la plej glora iĝis la poemaro "Kobzar", en kiu li montras suferadon de la servutuloj. Ŝevĉenko verkis kelkajn lernolibrojn por la ukraina popolo. Al la ĉeĥoj li havis ardan rilaton.

Komenciĝas la rondveturo ĉirkaŭ la ĉefurbo. Moskvo etendas sin sur 886 kvadratkilometroj kaj nuntempe havas pli ol sep milionojn da enloĝantoj. Kompare kun Leningrado Moskvo estas pli antikva,la komencon de ĝia historio oni metas en la duonon de la dekdua jarcento. Fine de la dekkvina jarcento estis konstruitaj muregoj, kiuj hodiaŭ borderas Kremlon. Tiutempe Moskvo jam estis ĉefurbo de la rusa ŝtato. Tiun funkcion ĝi plenumis ĝis la dekoka jarcento, kiam caro Petro la Granda faris metropolo Peterburgon.

Post la lasta mondmilito Moskvo ege kreskis kaj beliĝis.La antikva urboparto prezentas hodiaŭ nur guton en la maro da belegaj novaj konstruaĵoj, kiujn konstruis la diligentaj kaj talentaj sovetiaj arkitektoj kaj konstruistoj. /daŭrigota/

---

uj,kiuj havas same bonajn kaj purajn intencojn kiel ni mem.

Ni povus daŭrigi la enrigardon en nian perspektivan planon,sed estu jam sufiĉe. Vi,kara leganto de tiuj ĉi miaj vortoj, estu konvinkita pri la plej bona volo ne nur de la subskribinto, sed de ĉiuj liaj kunlaborantoj, kaj vi mem larĝe proponu vian helpon kaj montru bonan volon. Ni ja ne estas dekoj nek centoj, ni estas miloj, kaj se miloj da bonvolaj homoj montras sin pretaj pere de la Internacia Lingvo helpi nian ŝtaton kaj plene subteni la noblan ideon de tiom bezonata monda paco, tiam tutcerte la aŭtoritatoj plene subtenos nian klopodadon.La unua kelktaga kleriga kunesto de niaj funkciuloj aranĝita helpe de la Kulturministerio tion klare dokumentas.Ni komune zorgu pri baldaŭaj similaj aranĝoj!

La Novjaro estu la tago de nia bilanco,ni turnu la paĝon al nia sukcesa laboro!

Mělník,la lastan tagon de 1972 Josef Vítek

**SIGNALILO**

**FERVOJISTA SEKCIO**

**DE ĈEA**

UNUAFOJE EN SIA HISTORIO Fervojista sekcio de ĈEA okazigis sian jarkunvenon (la 18.-19an de dec.1972 en Česká Třebová) kun relative vasta partopreno de gekolegoj el najbaraj landoj.

La unuan tagon oni ekskursis al Litomyšl,trarigardante la kastelan bierfabrikon kun la naskiĝĉambro de la fama ĉeĥa komponisto B.Smetana kaj aŭskultante esperantlingvan paroladon pri lia vivo. Ĉiuj ricevis donace Esp.broŝureton pri la kastelo. Post la komuna tagmanĝo en Č.Třebová la vizitintoj ĉeestis popolan feston. Por partoprenintoj amuzan vesperon alvenis ankaŭ anoj de Esp.rondetoj el najbaraj urboj.

LA JARKUNVENO estis inaŭgurita dimanĉe per la Esperanta himno. Poste sekvis prezentado de geknaboj en popolaj kostumoj. La plej etaj rolantoj kantis popolkantojn kaj dancis ĉarmajn popolajn dancojn. La pli aĝaj rememoris per sia programero la 50an datrevenon de Soveta Unio. Ĉiuj ok eksterlandaj gastoj ricevis florojn kaj pupojn en nacia kostumo.

LA PREZIDANTO DE FS bonvenigis ĉiujn partoprenantojn, precipe la eksterlandajn kaj reprezentantojn de ĈEA. Salutvortojn prezentis la vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio d-ro F.Phersy, la prezidanto de Aŭstria Esperanta Fervojista Asocio inĝ. W.Huber, reprezentanto de UEA d-ro I.Bácskai kaj H.Diedrich, fervojisto el GDR.

# Jarkunveno de fervojistoj

La prezidanto de FS en sia parolado menciis kontentigan laboron de la estraro kaj komitato dum la pasinta laborperiodo. Li elmontris bonan agadon de ER en Č.Třebová gvidata de Iva Stolínová kaj substrekis bonajn laborrezultojn de la Terminara komisiono, kiun plurjare gvidas eksterordinare aktiva esperantisto inĝ. J.Řebíček.

La sekcia estraro, diris la parolanto, ne estas kontenta pri la varbado de novaj anoj kaj entute pri malpli granda aktiveco ol en la pasintaj jaroj. Li menciis, ke iuj gekolegoj foriris el la vicoj de la esperantistoj-fervojistoj, forgesinte la ideon de Esperanto - amikecon kaj kunlaboron inter la geamikoj. Fine li esprimis esperon, ke la laboro pliaktiviĝos kaj proponis regule okazigi renkontiĝojn de fervojistoj el najbaraj socialismaj landoj.

En la dua parto de la kultura programo kant-grupo el Č.Třebová prezentis Esperantajn kantojn.

EN SEKVAJ RAPORTOJ la sekciaj sekretario, redaktoro, kasisto, terminara komisiono kaj kronikisto bilancis sian laboron. Bedaŭrinde malaktiviĝis la komisiono por ekskursoj. La vicprezidanto de FS ĈEA F.Jindra prezentis laborplanon por la venonta periodo ; ĝi estis unuanime akceptita.

En libera diskutado la gekolegoj parolis pri instrumetodoj en lokaj grupoj k.a. Laboron de FS aprezis P.Polnický, sekr. de ĈEA. Adiaŭante ĉiuj deziris renkontiĝi dum la 4-a Esperanto-balo en Česká Třebová,la 3an de februaro. J.Pištora

## El Teknikista sekcio

● La konferenco de Teknikista Sekcio de ĈEA kunsidos en Ostrava okaze de la II-a Kongreso de ĈEA la 22an de aprilo 1973. Invitataj estas ankaŭ teknikistoj ne aliĝintaj al TS, kiuj interesiĝas pri E-o en rilato al tekniko.

● Lastatempe aktiviĝis teknikistoj kadre de Bulgara Esp.-Asocio. TS-ĈEA jam ligis kontaktojn kun la bulgaraj kolegoj.

● La informilo "TS Informas" en la februara numero alportas krom la kutimaj rubrikoj bazan elektroteknikan vortareton ĉeĥa-esperantan.

● Laŭ la instigo en STARTO 8/1972 aliĝis 2 (du) novaj interesitoj pri la bulteno "TS Informas". La rezulton oni povas konsideri kiel totalan malinteresiĝon.

● Inĝeniero-teknologo por fabrikado de agrikulturaj maŝinoj serĉas fakajn kontaktojn: Rudolfo DAMBERGS, str.Im.Sudmala 62-1,Liepája,Latvia SSR. (jw)

# Korespondi deziras

SOVETIO - Instruisto pri matematiko 50j kun 30 gelernantoj (15-30j.) serĉas amikojn en ĉiuj landoj. Resp. certa : Grigorij GERCIKOV, Kazaĥa SSR, Talgar-2, Kommunistiĉeskaja 278 • Studentino pri geografio 19j. kun gejunuloj : Alla EVGRAFOVA, Kuznecovskaja 44-304, SU-196199, Leningrad M-199 • Vlad. PRIADKO, Ukraina SSR Dnepropetrovskaja obl., p/o Nikolajewka, s/z Ordžonikidze

HUNGARIO - Redaktorino de "Orion Ujság" kun ĵurnalistoj, kiuj redaktas uzinajn ĵurnalojn (H-1475-Budapest 10, p.f.84, Éva BÁNHIDI) • Ibolya KOZMA, 12j. lernantino Fürs Sándor út.7, Györ. • Ilona RESZEGI, Tiszavasvári, Wesselényi ut.10 szám. • Lernanto 11-jara Gábor SZALÁNCZI, Györ 9021, Lenin ut.32.

POLLANDO - Jan SZYPRYT, oficisto 25j. ul. Pomorska 47/4 85-047, Bydgoszcz o Joz. STRYCZEK 25j. Slawiński 8/DA, 20-080, Lublin • Janusz PORA, 23j. teknikisto-farmaciisto, Plac Ratuszowy 44/45/3, 58-500 Jelenia Góra.

BULGARIO - Stojano STAJKOV, 28j. fraŭlo, p.k.67, Stara Zagora • GDR - G. HEGEWALD, 65 Gera, Gr. Kirchstr.23 • KUBO - Felipe FELIPE, Calle 23/1613 apt.31 e/28 y 30, Vedado, Habana 4 • NEDERLANDO - Nettie BUIS 16j. Berkenstraat 7, Krommenie kaj Margo SMINIA, 15j., Brug Mosselstraat 43, Krommenie, ambaŭ lernantinoj.

K o r e k t o : En 2-3/72 ĉe KUBO, Havana Esp. Rondo devis esti 314 (314) anst. malkorekta 413.

Novaj Esp. prospektoj riceveblaj ĉe : Azienda di Soggiorno 47037 Rimini kaj Azienda di Soggiorno 47036 Riccione (Fo), Italio.

Č S S R : Eva MALINOVÁ, Valašská Bystřice 577 o.Vsetín, kun la gejunuloj el Grekio, Hispanio, Belgio kaj Svedio.

## GAZETARA SPEGULO

La jubileon de ARTIA, ĉs. libroeldonejo por eksterlando, mencias artikolo de RUDÉ PRÁVO ("Kde kultura zvoní dobrou mincí, 4.1.1973), skribante, ke la entrepreno eldonis ankaŭ Poŝatlason en sep lingvoj inkluzive de Esperanto.

"Jazyk dorozumění mezi národy" estas artikolo aperigita 15.12.72 en NOVÁ SVOBODA, organo de Regiona komitato de KPĈ, Ostrava. La aŭtoro estas ER ĉe DK VŽKG.

Pri la solena vespero de la esperantistoj en Ústí n.L. omaĝe al la 55a datreveno de Granda oktobra revolucio skribas la 23an de nov. PRŮBOJ, org. de Nordbohemia regiona komitato de KPĈ.

Vjetnaman rakonton "Antaŭvespere de l' Tetfesto", elesperantigitan de O.Kníchal, publikigis la 20an de okt.72 literatura aldono de la ĵurnalo ZEMĚDĚLSKÉ NOVINY (300 000 ekz.)

Verŝajne la plej longan intervjuon pri Esperanto aperigis la gazeto "Freie Welt" (Berlino) komence de decembro (n-ro 50). Ĝi estas kvarpaĝa fotoriĉa interparolo de la redakcio kun D.Blanke, sekr. de CLE kaj red. de "Der Esperantist" - kaj kun K. Gusev, red. de la moskva "Pravda".

---

RADIO ROMA atentigas pri siaj elsendo-tempoj (ĉiudimanĉe de 21,00 ĝis 21,20 ) kaj ondlongoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| metroj | 30,90 | 41,24 | 50,08 |
| kh | 9.710 | 7.275 | 5.990 |

La supraj ondlongoj validas ĝis la fino de februaro, post tiam anst. metroj 50,08 (kh 5.990) oni aplikos metrojn 25,42 (kh 11.800), dum la ceteraj ondlongoj restas senŝanĝaj.

STARTO VOLONTE RECENZOS ĈIUN PUBLIKAĴON, SE LA ELDONISTO SENDOS ĜIN AL LA REDAKCIO !

---

S T A R T O - eldonas ĈEA, p.k.8, 120 21 Praha 2. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro Oldřich Kníchal. Red. komitato : inĝ. E.Felix, J.Mařík, inĝ.F.Sviták. Abonebla por la asociaj membroj. - Dohlédací pošta Praha 07, sníž.pošt. poplatek pov.ŘP Praha j.zn.P/1-2283/71 ze dne 6.5.1971. Toto číslo předáno do tiskárny 22.ledna 1973.

---

ĴURNALISTOJ TUTMONDE, KIUJ EMAS KUNLABORI HELPE DE E-O, KONTAKTU "Starton" !!